# *11a Alfonsa Semajno*
# *inter la tria kaj la sesa tago*

*de Giuseppe Castellese, Palermo*
***P. Alberto Maggi***

Ĉu trovos la Filon de la Homo... "kiu havas fidon? aŭ ne pli simple:"....li trovos la Fidon? " per tiu ŝanĝo de devizo, malfermiĝas kaj fermiĝas idee la rezonado de P. Alberto Maggi, kiel ĉiam verva polemikemulo ....ama. La biblisto konkludas, ĉu hazarde? preskaŭ per la samaj vortoj de la historiisto (la Ĉefepiskopo Mons. Cataldo Naro je la fino de la sesa tago), ke Jesuo, resurektinta, ĉieliris al la Patro, Li restos kun ni ĝis la tempofino. Sekve Li "ne revenas": la komencan demandon, ekde nun ne malpli malkvietiga, oni devas lokigi, do en la dramega kaj dolora momento kiun Jesuo estas travivonta: lia krucumado. Sed la konkludo sonus egale seniluziiga, supraĵa kaj eĉ malrespektema se oni ne sekvus la itineron jam skizitan dekomence pere de evangeliaj "bildoj" kie manifestiĝas la signifo de "fido"disigita disde "religio".

**1. Jesuo ne estas profeto** kaj Li ne moviĝas kiel, male, faras la profetoj, ene de la religia logiko eĉ or ĝin reformi.Ĉar anstataŭe Li invitas foriri el la religia medio kaj ĝin elradikigas por montri ĝian putraĵon. La religio malhelpas la agordon kun Dio kaj Jesuo tion evidentigas tagon post tago; pro tio la religiaj instancoj volas Lin mortinta.
La propono de Jesuo estas nova rilato kun la Patro; kaj kiel la nova vino, la nova propono bezonas novajn felsakojn, novajn ujojn. La nova agordo kun Dio prenas en Jesuo la difinon de "fido"
Resumante: la religio montras ĉion kion, laŭ la kutima rito, la homo povas kaj devas fari rilate Dion; la fido indikas ĉion kion Dio faras por la homoj: Dio, laŭ Jesuo, nenion petas de la homaro sed Li sin komunikas al ĝi; Dio akceptas la homojn kaj tiu akcepto nomiĝas Fidon, kiu ne estas "donaco" al la homaro, sed estas la respondo de homo al senpaga amdonaco kiun Dio faras al la tuta homaro.
Jen ĝuste ĉi tie la malsameco:
- La Dio de la Evangeloj, Dio absolute nur bona, komunikas al ĉiuj Sian Amon sendepende de la sinteno, de la posicio, de la situacio de la ricevanto.

**2. Evangeliaj bildoj.**
- La unua "bildo", kiel klarigo, estas donata en Luko de la resaniĝo de la 10 lepruloj. El la dek nur unu revenas.
Konkludo: La Amo de Dio estas por ĉiuj; la fido, tamen, estas evidentigata eĉ laŭdata en la ununuopulo kiu revenas por danki: filo, via fido vin savis. Via "Fido"!
- Sed estas io plia: por Jesuo tio kio, laŭ la religio estas konsiderata kiel malobeo kaj malpiaĵo, laŭ orientiĝo tute malsama, fariĝas atesto je fido: la adultulino kiu maloservas la leĝon ne plu trovas la atenteman, komdamnantan Dion, sed ŝi trovas la Patron kiu onin atendadis kaj onin akceptas dirante: filo, via fido vin savis. Kaj tie revenas la Alberto Maggi kiu volante sin distancigi de la "hipokriteco" de gepiuloj, de homoj sin sentantaj jam certaj kaj jam "savitaj" ene de la barzono, alvenas al rimarkoj kiujn, kiel mi vidis sukcesis akrigi la ofendiĝemon de tiuj (de la sakristano ĝis pli alten...) opinias havi ardajn respondecojn en la defendo de la ortodokseco aŭ de la eklezia bildo kaj hodiaŭ de Kristo mem: al ĉi tiuj ŝajnas, ke la frato, kiu asertas esti mem biblisto, uzas senmezuran dirmaieron, ne adekvatan al la "identeco de iu *ecclesia* kiu ŝatas la aperon.
Kelkaj homoj, ŝokitaj, montras hipokrite (eble, ni esperu, bonfide!) eĉ iliajn orelojn skandaligitaj: imagu ĉiujn de la malproksimuloj, ili diras, flustrante. Kaj, male, kiel homo sin sentanta jam imuna, mia impreso estas tute alia: Maggi liberigante el la krustoj la parolon de Jesuo (kelkfoje mi eĉ pripensas ke laŭ la jarmiloj oni ongletadis ankaŭ la Evangelion) ebligas al kiuj estas konsiderataj kiel la "malproksimuloj" sed verŝajne aŭskultantaj kaj ŝerĉantaj, tuj post la sanitara kordono etendita de la "proksimuloj" kaj "sanktuloj", mi ripetas li ebligas alproksimiĝi al Jesuo, kies allogon li sentigas al ĉiuj "malproksimaj", kiuj ne alkutimiĝis remaĉi preĝetojn.

- kaj jen la bildo, kutime manipulita de spertaj pastroj, kiu aperas en la tuta sia" krudeco", Luca 7,26.
Jesuo estis invitita al festeno ĉe Fariseo kiu ĉi foje havas nomon: Simono. La fariseoj estas ege ĉikanemaj "observantoj" de tre granda nombro da eksteraj preceptoj: li havas 1531 el ili por ĝui dum la tuta tago. Do, ili estas konsiderataj antonomazie kiel perfektaj, la asketuloj, la spiritaj homoj; sed Jesuo, kiel ni jam scias, ilin malkovras: "hipokrituloj, speco da vipuroj; tomboj blankigitaj.
Kial, do la fariseoj invitas Jesuo? Kelkfoje ili esperas povi Lin altiri ĉe ilia flanko; pli ofte por
Lin insidi kaj povi, poste, enkotigi, miskredigi, kaj kulpigi Lin.
La evangelisto, post kiam li prezentis la kutimo (Jesuo enirinte sterniĝis ĉe la manĝotablo) *trumpetadas por veki...*
Virino eniras....kaj kuntiriĝas malantaŭ ĵesuo, ĉe Liaj piedoj...
Ĉu virino? Sed la virinoj estas en la kuirejo, ili ne rajtas montriĝi table! Kaj krome, ĉu en la domo de fariseo?!
La virino estas laŭnature malpura; naskiĝi virino estas malfeliĉo.... entute, minimume ŝi estas viro...ekputriĝinta. Dio mem ne parolas kun la virinoj....ekde post kiam Sara. jam maljuna, *ekkrevis pro ridado* je la dia anonco ke ŝi en sia maljunega aĝo naskos infanon!
Sed la disŝira reago estas ankoraŭ venonta: tiu virino estas *prostitulino!* Ŝi venis eĉ kun la metiiloj: ŝi alportas la ŝmirujon...la masaĝistino!
Kaj eĉ pli taŭza afero: tiu ĉi prostitulino ne estas Magdalena; ŝi neniam ŝanĝos sian vivon; kaj rigardu... oni ne petas ŝin ke ŝi sin pentu! La priskribo de la Evangeliisto fariĝas pli preciza kaj mi dirus, provoka se oni konsideras la alegoriajn signifojn de la "bilderoj": la prostitulino venis *intence* por Jesuo: plorante, ŝi komencis bani (*liajn piedojn) per siaj larmojn*, poste ilin sekigadis per sia *hararo,* kaj ilin surŝutadis per *parfumita* oleo". La malplektigo de la hararo...eĉ ne surhavi la vualon estis afero vere gravega (la virino kiu montris sian hararon estis inda je repudio) kaj Sankta Paŭlo mem konsilis: "la virinoj surhavu vualon pro la anĝeloj "laŭ tiutempa kredo, la anĝeloj mem ekscititaj je la vido de la hararoj, el la ĉielo trarabis la filinojn de Eva! Do, la prostitulino, uzas kun Jesuo la artojn de la delogado; la nurajn kiujn ŝi konis kaj pro kiuj ŝi estis kreskita! Kaj Jesuo ne evitas ŝin, ekscitante la reagon de la fariseo: "se tiu estus profeto, li scios kia virino estas kiu lin palpas kaj palpadas!"
Tiam Jesuo intervenas: "Simono mi havas ion por diri al vi". La fariseo estas ĝenata, malbonhumora kaj al la peto de Jesuo kiu lin demandas pri la favorataj ŝuldantoj... li respondas: mi supozas...( la ŝuldanto kiu havis nuligitan la plej grandan ŝuldon plej amos sian kreditoron).
Jesuo estas tie preta: (la religiemuloj havas trabon foksitan en siaj okuloj kaj vidas ĉion distorditan de la religia ideologio), la fariseo indikis la prostitulinon; Jesuo korektas lian vidon: "Simono, ĉu vi vidas *tiun ĉi virinon....* pro tio mi diras al vi al ŝi estas pardonataj siajn multajn pekojn, ĉar ŝi multe amis".
Poste Li diris al ŝi: "viaj pekoj estas pardonitaj; vian fidon vin savis, iru en paco".
Tiu virino ne iris al Jesuo por peti pardonon, ŝi iris al li por lin danki por ke ŝi jam atingis la pardonon,
Tiu estas la novaĵo alportita de Jesuo: Dio ne invitas la pekulojn peti pardonon: en la religio la pardonon, la Dian Amon oni devas "*meriti";* por Jesuo ne estas tiel: li ne akceptas ke en sia nomo oni povu diskriminacii homojn, klasojn.... kia ajn estu ilia konduto, sinteno, seksa vivo; pro tio en la Fido la pardonon oni devas nur..."*akcepti"*. Tie kuŝas la grandan malsamecon... ne ĉiuj havas meritojn por prezenti al la Sinjoro, sed... ĉiuj havas bezonojn. Ni ne scias kiel finis la historion.
La prostitulino ne havas nomon, do ŝi ne indikas homon sed klason, t.e. ĉiuj kiuj troviĝas en sia situacio. Kaj plue, la prostitulino tiam troviĝis en stato de neceso: ŝi ne sciis alion fari por sin vivteni; ŝi ne povis reveni en sia familio, ŝi ĝin neniam havis mem; ŝi ne povis edziniĝi; neniu prenos ŝin kiel edzinon.

Sed ĉe la horizonto kiel en krepusko oni ekvidas eblecon: pere de Jesuo estas formiĝanta nova familio. Li trairis urbojn kaj vilaĝojn kaj estis kun Li la 12 kaj kelkajn virinojn.... ”Min jukas emo aldoni.... Jesuo ne kutimas lasi ion nekompleta!